



FAKTOJ KAJ FANTAZIOJ

D-ino Marjorie Boulton certe ne ĉagreniĝos pro la fakto, ke ni prunteprenis la titolon de ŝia majstra verko por enkonduki vin al la legado de ĉi tiu teksto, anstataŭ recenzi ŝian libron. Por garantii, ke ŝi ne ĉagreniĝos, mi devas almenaŭ rekomendi la trarigardon de la recenzo aperinta en la revuo ESPERANTO (n-ro 946, 1984/oktobro). Se vi legos ĝin, sendube vi tuj decidos men di la menciitan verkon.

La ĉi-suban fabelon mi ne trovis en la libro de S-ino Boulton, sed en reklamo aperinta en brazila ĵurnalo:

Iam estis viro, loĝanta marĝene de vojo, kiu vendadis sandvisojn. Iom post iom li pligrandigis la vendadon kaj la aĉetadon de viando kaj pano. Tuj li aĉetis pli grandan fornon por pli bone akcepti la klientojn. La negoco progresadis. La viro sukcesis trovi bonan lernejon por sia filo. Iam, la filo, jam posedanta la bakalaŭran diplomon, diris al la patro: "Patro, ĉu vi ne aŭdas radion? Ĉu vi ne legas ĵurnalojn? Estas granda krizo en la mondo. La situacio estas terura. Ĉi tie en nia lando la situacio estas eĉ des pli malbona". Sekve, la patro rezonis: "Mia filo studadis, li legas ĵurnalojn kaj aŭdas radion. Do, li nepre pravas". Ekde tiam la patro komencis malgrandigi la kvanton da aĉetaĵoj; li reduktis la kvanton de saŭco kaj de spicaĵoj en la sandviŝoj kaj ekŝparis reklamajn afiŝojn. Li jam nek plu laŭtvoĉe instigadis la klientojn al la aĉetado, nek entuziasme babiladis kun ili, pro la deprimaj krizaj novaĵoj. Senprokraste, komen ciĝis la falado de la vendoj. Post nelonge, venkita de sia propra malentuziasmo, la patro devis konstati la malagrablan realon: "Vi pravis, mia filo. Fakte ni estas ene de granda krizo".

En nia brazila esperanto-movado ankaŭ estas kelkaj bone instruitaj homoj, kiuj simile al la bonintenca filo, atentigas la esperantistaron pri krizo ĉe ni. Ili avertas la samideanojn pri la urĝa neceso ŝanĝi la nunan situacion, pro la ekzisto de tri landaj asocioj, kaj eĉe kuraĝas subs kribi ultimaton kun tiaj finaj vortoj:

"Se la ĝeneralaj kaj bazaj punktoj de ĉi tiu propono ne estos akceptataj aŭ iel ne povos realiĝi ene de la proponita limdato, la subskribintoj de ĉi tiu dokumento kunvokos ĉiujn ŝtatajn organizaĵojn renkontiĝi ĉe en Brazilo kaj propra-iniciate fondi la FEDERACION, preter la aprobo de la nun ekzistantaj organiza-ĵoj".

Ŝajnas, ke Montaigne tute pravis, kiam li diris: "Ĉiu parolas foje sensencaĵojn; la malfeliĉo estas, ke iuj parolas ilin solene".

En Julio 1984, oni okazigis la 20-an Brazilan Kongreson de Esperanto, kies temo "Integriĝo en la brazila esperanto-movado" estis demokrate debatita. Kelkaj partoprenantoj prezentis siajn tezojn pri la integriĝo, ene de respektoplena kaj frata etoso. Kiel rezulto de tiu Kongreso, oni redaktis kaj aprobis rezolucion, kies teksto estis sufiĉe bone disvastigita. Dum la Kongreso, neniu reprezentanto el la brazilaj sudaj ŝtatoj sin prezentis por defendi specialan tezon pri la

ĉeftemo de tiu gravega okazaĵo. Kvar monatoj, post la Nacia Kongreso (20-a Brazila Kongreso de Esperanto), dum Regiona Renkontiĝo (3-a Sudbrazila Renkontiĝo de Esperanto), oni prezentis al la partoprenantoj de tiu evento proponon pri la restrukturigo de nia movado, por urĝe savi ĝin.

Anstataŭ analizi la kernon de la propono prezentita, mi sugestas, ke oni pripensu pri la kon veneco de iu ajn tuja ŝanĝo en la strukturo de la brazila movado. Unue, estas konvene, ke oni plurfoje legu la rezolucion de la 20-a Brazila Kongreso de Esperanto. Due, ni individue klopodu respondi la jenajn demandojn:

- 1. Ĉu la Brazila Esperanto-Movado fakte estas en krizo? (Ĉu la krizo estas fakto aŭ fanta-zio?);
 - 2. Kiuj estas la simptomoj de movada krizo?;
- 3. Ĉu la rilatoj inter la tri landaj asocioj, nome B.E.L., K.K.E. kaj B.K.E, nuntempe ne estas sufiĉe bonaj?;
- 4. Ĉu la Nacia Esperanto-Komisiono, kun la apogo de ĉiuj aliaj asocioj ne sufiĉas por planadi pri la estonteco de nia agado?;
 - 5. Kial urĝas ŝanĝi la nunan situacion de nia movado?;
 - 6. Ĉu la nombro de esperantistoj en Brazilo malkreskas en la lastaj jaroj?;
 - 7. Ĉu ni ne plu eldonas Esperantajn verkojn?;
- 8. Ĉu mankas al ni vortaroj, lernolibroj, modernaj didaktikaj metodoj por disvastigi Esperanton?;
- 9. Cu mankas informiloj por transdoni al la nacia gazetaro novaĵojn pri niaj lastaj konkeroj?;
- 10. Ĉu por plibonigi la nunan situacion de la lokaj asocioj, societoj, kluboj aŭ grupoj nepras, ke la tri landaj asocioj tuj kunfandiĝu? Aŭ, ĉu la vigligo de tiuj societoj dependas ĉefe de la diligenteco, kreiveco kaj aktiveco de ĝiaj propraj estraranoj?;
- 11. Ĉu la sinteno de la gazetaro kaj de la ĝenerala publiko rilate al Esperanto tuj pliboniĝos pro eventuala ŝanĝo de nia strukturo?;
- 12. Ĉu ne estas preferinde, ke dum la plej proksimaj jaroj ni koncentrigu niajn fortojn por ekzercadi nian kapablon kunlabori kaj kunagadi por la movado, anstataŭ afliktiĝi pro nevidebla krizo?

Se, post serena meditado pri la supraj vortoj, oni daŭre klopodos, pere de premantaj metodoj, modifi la vojon elektitan okaze de la 20-a Brazila Esperanto-Kongreso, do, ankaŭ restos al mi nenio, krom konstati, ke oni pravis: Fakte, tiam, ni estos ene de granda Krizo!

Fernando Marinho

ESPERANTO EN LA AMASKOMUNIKILOJ DE RIO DE JANEIRO

La pasinta monato (februaro) estis tre favora por Esperanto en la amaskomunikiloj de Rio de Janeiro.

La 3-an, ĉe TVE (Eduka Televidstacio), ĵurnalisto Jonas Resende, en sia programo "Conversa de Fim de Noite" (Babilado ĉe la Nokto-fino), dissendita je la 01.00 horo, elektis kiel temon la internacian lingvon.

La 4-an, "Rádio MEC" (Radio Ministerio pri Edukado kaj Kulturo) intervjuis D-ro Victor Sadler pri la projekto D.L.T. kaj prezentis ĝin en la informprogramo "Espaço Aberto" (Malfermita Spaco), dissendita, ĉiutage, de la 16,00 horo ĝis la 16hl5m.

La 5-an, tiu sama radistacio, en la sama programo, dissendis 15-minutan intervjuon de la Prezidanto de BEL, S-ano Fernando Marinho, kiu prezentis ĝeneralajn informojn pri la lingvo kaj movado. La intervjuinta ĵurnalisto informis nin ke la intereso de la Departamento de Ĵurnalismo de "Radio MEC" estis kaŭzita de la informoj ricevitaj pere de "Esperanto-Noticias", kiun BEL sendas regule al ili.

La 6-an, je la 11h55m, ĉe "TV-Bandeirantes" (Kanalo 7), en la programo de la institucio "Legião da Boa Vontade" oni menciis la partoprenon de junaj reprezentantoj de tiu organizaĵo en la Kongreso de BEJO, en Cuiabá.

Fine, la 24-an, S-ano Elmano Barbosa estis intervjuita pri Esperanto, dum 45 minutoj en spiritisma programo, dissendata ĉiudimanĉe de la 11,00 horo ĝis la 11h45m, pere de "Rádio Rio de Janeiro".

MALLONGE ... PRI LA BRAZILA MOVADO

BEJO-KONGRESO: SUKCESO ĈE AŬTORITATULOJ KAJ AMASKOMUNIKILOJ - La VII BEJO-Kongreso, kiu okazis en Cuiabá, MT, de la 21-a ĝis la 27-a de januaro estis multflanke sukcesinta.

Ĉirkaŭ 150 personoj, dum unu semajno, ĝuis la agrablan etoson de la Kongreso kiu havis variajn kunvenojn, ĉu distrajn, ĉu seriozajn, kiel ekzemple, tiuj kie oni diskutis la ĉeftemon de la Kongreso: la Paco.

Sed, la plej elstara rezulto de la Kongreso estis sendube la senkondiĉa apogo de la urba kaj ŝtata aŭtoritatuloj kaj la grandega intereso de la lokaj amaskomunikiloj (ĵurnaloj, TV, radio ktp...), kiuj, ĉiutage, dissendis informojn pri la Kongreso. Ĉi-flanke, parto de la ĉeestantoj fotitaj de nia speciala sendito Ronaldo Alves de Oliveira, la juna oficisto de BEL.



ESPERANTISTOJ EL ITABUNA KAJ ILHĒUS FESTAS ZAMENHOF

La 15-an de decembro, esperantistoj el la sudo de ŝtato Bahia festis la datrevenon de Zamenhof, en Itabuna, per varia programo, ĉe "Sociedade Montepio dos Artistas".

En la apuda foto, sendita de Samideanino Chantal, aperas parto de la ĉeestantoj al tiu kunveno.

IMITINDA INICIATO: AKADEMIANO GERALDO MATTOS GVIDIS KURSON POR ESPERANTO-INSTRUISTOJ EN BRASILIA - De la 4-a ĝis la 9-a de februaro, Esperanto-Asocio de Brasilia okazigis kursojn por 50
esperanto-instruistoj venintaj el 7 brazilaj ŝtatoj.

Matene, okazis la 20-hora Gramatika Kurso kaj, vespere, la ankaŭ 20-hora Pedagogia Kurso. La iniciato de EAB bonege eĥis ĉe la gazetaro de Brasilia, kiu publikigis allogajn novaĵojn antaŭ, dum kaj post la Kurso.

Ĉi-flanke, aperas kelkaj partoprenantoj, inter ili, la 15jara Amilton, la plej juna partoprenanto.

(Laŭ informoj senditaj de EAB)



NOVA LERNOLIBRO DE SYLLA CHAVES, ELDONITA DE BEL, ESTAS VAR-ME REKOMENDITA - De nia S-ano Adonis Marcello Saliba Silva, Acesita, MG, ni ricevis leteron kun la jenaj rekomenditaj vortoj pri la nova lernolibro de Sylla Chaves, AÜDU KAJ LERNU, Legolibro l/Elementa, eldonita pasintjare de BEL kaj Fondaĵo Getúlio Vargas: "Acesita E-Klubo bone funkcias ĉiuj sabatoj, de la 15-a ĝis la 17-a horo, en "Master School de Acesita". Ĝis nun, oni havas pli malpli 10 membrojn. Mia nura funkcio en la Klubo estas esti instruisto de Esperanto kaj instiganto de ilia perfektiĝo por esti kiel eble plej perfektaj esperantistoj. Diversaj el ili jam bone parolas la lingvon, kaj tio bone pruvas, ke la nova metodo de Sylla Chaves bone funkcias kaj meritas nian ĝeneralan agnoskon. Mi nur atendas la duan kaj trian libron de la metodo. Eble vi jam ricevis du el la ĵurnaletoj de nia Asocio, kredu min sed mi ne tuŝis eĉ literon de tiuj du eldonoj, krom miaj propraj artikoletoj. Ili mirigis min mem, ĉar tiuj bultenoj devenis de jus-bakitaj esperantistoj. Volu Dio, ke tiu grupo iru antaŭen!"

REVUO "AABB", DENOVE, PRI ESPERANTO - Ankoraŭ eĥas ĉe Revuo "AABB" (Asocio de Oficistoj de Banco do Brasil) la kurso de Esperanto tie farita de S-ano Jorge das Neves. En ĝia februara eldono, sur paĝo 17, aperis la ĉi-apuda foto de la kursfinintoj, kun simpatia komentario.



MALLONGE ... PRI LA BRAZILA MOVADO

ARTIKOLO PRI ESPERANTO EN "JORNAL DA TIJUCA" - aperis, sub la redakto de S-ano José Rabello de Paula, en la eldono de la 2-a de februaro.

MEMBRO DE BEL FARIĜIS VIC-REKTORO ĈE FEDERACIA UNIVERSITATO DE PELOTAS - La 6-an de decembro pasintjare, S-ano Paulo Domingos Mieres Caruso fariĝis Akademia kaj Helpa Vic-Direktoro ĉe Federacia Universitato de Pelotas. Koran gratulon!

INAÜGURITA LA SIDEJO DE ESPERANTO-ASOCIO DE BRASÍLIA - "Post 22 jaroj de ĝia ekzisto, Esperanto-Asocio de Brasília (EAB) sukcesis aĉeti sian propran sidejon, per la parto destinita al ĝi el la profito de la 66-a Universala Kongreso de Esperanto. La sidejo situas en moderna konstruajo tre proksima al la urbocentro. Krom la komforta lernoĉambro, ĝi havas sekretariejon, kie ankaŭ funkcias la libroservo kaj biblioteko". Tiel skribis al ni S-anino Neia Lucia de Souza, nuna Prezidantino de EAB.

BULTENO PRI TEATRO PUBLIKIGAS ANONCON PRI ESPERANTO - "Teatro Major", oficiala bulteno de "As sociação dos Espectadores de Teatro do Rio de Janeiro" publikigis anoncon pri esperanto, elprenante desegnon kaj tekston el la prospekto de BEL "Como ter 1 milhão de amigos".

VOLONTULA INSTRUISTO DE ESPERANTO SERĈATA - En "Avante", oficiala bulteno de "Peregrinos do Caminho de São Tiago", januaro/85, aperis la jena anonco: "Estamos precisando de professor voluntário de esperanto, além de material didático (livros, slides, discos de pronúncia etc...). Nosso endereço: Rua São José, 461 - CEP 36350-SÃO TIAGO, Minas Gerais".

ARTIKOLO PRI ZAMENHOF ĈE FILATELIA ĴURNALO - S-ano Jorge Bastos Furman (Av. Geremário Dantas, 273, bloco B, apt? 404, Jacarepaguá, 22700-RIO DE JANEIRO, RJ) informas nin ke aperis artikolo pri la vivo kaj verko de Zamenhof ĉe la 30-a numero de "Jornal do Selo" (Rua da Assembléia, 36 - grupo 303/4, Centro, 20.011-RIO DE JANEIRO, RJ). La aŭtoro de la artikolo estis S-ano Lister de Lima.

62 NOVAJ ESPERANTISTOJ EN MINAS GERAIS - Laŭ informo publikigita en "Informilo" no 04/84, Bulteno de la "Departamento de Esperanto da União Espírita Mineira", 38 novaj esperantistoj en Belo Horizonte kaj 24 en Pedro Leopoldo finis sian bazan kurson. Laŭ tiu sama bulteno, en Divinopolis, de la 3-a ĝis la 14-a de decembro okazis, en la municipa biblioteko, ekspozicio pri Esperanto, sub la kunordigado de S-ano Paulo R. Santos. Kaj la 15-an de decembro, 80 samideanoj, venintaj el pluraj urboj de la ŝtato Minas Gerais festis, en Belo Horizonte, la datrevenon de Zamenhof.

ESPERANTO ĈE LA FEDERACIA UNIVERSITATO DE PARANA: LA AFERO EVOLUAS - Laŭ "Parana Informilo", nº 04/85, feb/marto 85, la afero pri la Kurso de Esperanto ĉe la Federacia Universitato de Parana evoluis: "Dum marto, la profesoroj de fremdaj lingvoj, de la Federacia Universitato de Parana ha vos specialan lernoobjekton: Esperanton. Profesoro Geraldo Mattos gvidos la kurson, kiu celos unue doni al tiuj profesoroj kulturan bazon en interlingvistiko. La kurso estis sugestita de la ĉefo de la fremdlingva departamento, post ekzameno de kandidato al doktoriĝo kiu - demandite de profesoro Geraldo Mattos, unu el la ekzamenantoj - ne sciis precize informi pri la esperantaj laboroj de unu el la majstroj de "internacia lingvonormigo" (pri tio temis la tezo de la kandidato), Eugen Würster."

BAHIA AKTIVAS - Laŭ raporto rilate al 1984 de Bahia Esperanto-Asocio, oni multe aktivis por la internacia lingvo en tiu ŝtato. Kursoj, prelegoj, surstrata informlaboro, partopreno de membroj de ABE en Kongresoj ktp ... estis kelkaj el la multaj aktivecoj de tiu Asocio. Tamen, tutcerte, la plej elstara informo prenita el tiu Raporto estas, ke dum la pasinta jaro, 406 (!) personoj studis esperanton en la sidejo de ABE. Gratulon!

NITEROI E-KLUBO RAPORTAS - Kursoj kaj informoj pri esperanto en ne-esperantistaj bultenoj estis la Ĉefaj laboroj de Niteroi E-Klubo en la pasinta jaro. Pri agado de tiu malnova E-Klubo sendis raporton al ni, ĝia Prezidanto, S-ano Joaquim de Couto.

PRELEGO PRI ESPERANTO EN UBÁ - Laŭ informo de S-anino Edina de Barros Reis, la 23-an de februaro efektiviĝis prelego de S-ano Francisco Ferreira de Souza pri la internacia lingvo ĉe "Associação dos Empregados do Comércio" de Ubá, en Minas Gerais.

KURSO DE ESPERANTO EN MACEIÓ - Post prelego farita de S-ano Ezequias Alves, Prezidanto de "Associação Alagoana de Esperanto", laŭ invito de "Movimento Comunitário do Bairro Vergel", en Maceió, funkcias kurso de esperanto en tiu loko, kun semajnaj lecionoj, gvidita de S-ano Neider Jatobá (Laŭ "Klariono" dez/84).

<u>ĈIUSEMAJNA INFORMO PRI ESPERANTO</u> - aperas en Spiritisma Bulteno SEI (Serviço Espirita de Informações).

KURSO DE ESPERANTO POR INFANOJ, EN RIO DE JANEIRO - Finiĝis, en decembro pasintjare, nova kurso destinita al infanoj kaj organizita de E-Grupo Ismael Gomes Braga. Estis aljuĝita diplomoj al kvar infanaj kursfinintoj (laŭ "Çorreio Fraterno", feb/85).

MALLONGE ... PRI LA BRAZILA MOVADO

CELTRAFAJ ARTIKOLOJ PRI ESPERANIO EN ĴURNALO "ALAVANCA" - S-ano Daviv Bianchini, ĉiumonate, publikigas celtrafajn artikolojn pri esperanto en la ĵurnalo "Alavanca", eldonita en Campinas, SP. Jen la titoloj de kelkaj interesaj artikoloj jam aperintaj: "Pensando em termos de paz no mundo" (okt/84); "Quando o esperanto é o único meio para as crianças brincarem ..." (nov/84); "Em 15 de dezembro, homenagem a Lazaro Luis Zamenhof" (dec/84) kaj "Um dia dedicado à Confraternização Universal" (jan/85).

NOVA E-GRUPO EN RIO DE JANEIRO - Nun temas pri E-Grupo L.L. Zamenhof, funkcianta ĉe "Centro Espirita Leon Denis (Rua Abilio dos Santos, 137 - Bento Ribeiro, 21.331 - RIO DE JANEIRO, RJ). Jam okazas tie kurso, sub la gvidado de nia S-ano Givanildo (laŭ "Correio Fraterno", feb/85).

II SPIRITISMA-ESPERANTISTA SEMAJNO DE LA FEDERACIA DISTRIKTO - Sub la respondeco de "Federação Espírita do Distrito Federal" okazos, de la 24-a ĝis la 30-a de marto 85, la II Spiritista-Esperantista Semajno de la Federacia Distrikto.

"III REUNIÃO DE ESPERANTISTAS DA REGIÃO DE SOROCABA" - okazis la 24-an de februaro, en São Roque, SP, aŭspiciita de Esperanto-Klubo de São Roque kaj Sorocaba E-Klubo.

ĜENERALA ASEMBLEO DE KKE - okazos, la 9-an de marto, ĉe la sidejo de KKE (Av. 13 de Maio, 47 sobreloja 208, RIO DE JANEIRO, RJ), je la 15h30m, kiu pritraktos, interalie, la elekton de nova estraro de la Kooperativo por la periodo 1985/1988. Laŭŝajne, S-ano Dilermando fariĝos la nova Prezidanto de KKE.

ANGLALINGVA PRELEGO PRI ESPERANIO EN RIO DE JANEIRO

La 23-an de februaro lasta, en la sidejo de la Klubo STANDARD PHONIC DRILL CENTRE, en la centro de Rio de Janeiro, Prof. Sylla Chaves faris anglalingvan prelegon pri Esperanto. Estis pli ol 50 aŭskultantoj, kaj ĉiuj bone scipovis almenaŭ du lingvojn. Chaves prezentis la temon el la pers pektivo de homaj rajtoj kaj homaj rilatoj, kaj ricevis multajn demandojn kaj varmajn aplaŭdojn. Post la prelego aperis laŭda recenzo pri ĝi en la tutbrazila anglalingva gazeto BRAZIL HERALD. Tio pruvas, ke plurlingvanoj povas bone akcepti nian poresperantan argumentadon, kondiĉe, ke ni trafe prezentu ĝin.

OBJEKTIVA ARTIKOLO PRI ESPERANTO EN "TRIBUNA DA CIDADE" - En Rio de Janeiro, ekzistas Fakul tato nomita "Cidade". La Departamento pri Komunikado de tiu Fakultato eldonas la monatan ĵurnalon "Tribuna da Cidade". Ĝia eldonkvanto: 20.000 ekzempleroj. Ĝuste en tiu periodaĵo, en la februara numero, aperis objektiva artikolo pri la internacia lingvo, kies titolo estis "Esperanto: paroli ne ofendas ou se preferir, Esperanto: falar não ofende". La aŭtoro de la raportaĵo estis S-ro Mau ro Ferreira, ĵurnalisto kiu apartenas al la Redakta Komitato de tiu gazeto.

NOVA STELO EN LA ĈIELO: "EL ACESITA KLUBO", ORGANO DE ACESITA E-KLUBO - "A semente está lançada. Após algumas semanas de curso ministrado pelo Adonis, agora nosso clube está formado, ou melhor dizendo, ele está germinando, ainda dependendo de um grande esforço de nós para manter-se. E é para nós, esperantistas, um grande passo o lançamento de nosso jornalzinho. Ele significa o resultado de muito trabalho, estudo e muitos bons momentos. Significa também o compromisso que agora nos liga ao clube. E' o nosso instrumento de fazer-nos ouvir" Tiel prezentiĝas "El Acesita Klubo", bulteno de Acesita E-Klubo, en sia unua numero. Bonvenon kaj longan vivon!

KULTURKUNVENOJ EN LA SIDEJO DE BEL - PROGRAMO POR APRILO/85

- 06/04 KONVERSACIA RONDO (skeĉoj, vortludoj, kantado, informoj, ktp ...)
- 13/04 Prelego de S-ano José Luís Ferreira, Prezidanto de BEJO, pri la temo LA JUNA ZAMEN-HOF.
- 20/04 KONVERSACIA RONDO
- 27/04 Legado de la teatraĵo de Machado de Assis "LA KUDRILO KAJ LA FADENO (reĝisoro Alfredo Aragón).
 - * Ĉiuj kunvenoj komenciĝos je la 16-a horo *

ANONCETOJ:

- Hungara junulo 30-jara, volas korespondi kun brazilanoj: István Mády, H-8600 SIÓFOK, Kele u. 26, Hungario.
- -"Mi nomas min Olgiencl kaj estas lernanto. Mi havas 17 jarojn, loĝas en Szczecinek, en Pollando, Mia urbo kuŝas sur marbordo de Balta Maro. Mi ŝatas min okupi pri filozofio, historio kaj homoj. Ankaŭ mi ŝatas futbalon". Olgiencl Bielevicz, ul. Kviatowa 52, 78.400-SZCZECINEK, Pollando.

NOVAĴOJ PRI BEL

VOLONTULO RAPORTAS PRI BEL - Inter la 12-a de februaro kaj la 4-a de marto, BEL kalkulis pri la volontula laboro de la juna samideano Aristophio Andrade Alves Filho, el Manaus, Amazonas. Dum tiu periodo, li havis okazon labori en ĉiaj sekretariejaj taskoj ĉe BEL. Ĉe la fino, ni petis al li raporti pri tiu sperto. Jen lia opinio:

"Pere de ĉi tiuj linioj, mi volas esprimi mian dankemon al BEL, pro la ebleco donita al mi, labori iomete por la brazila esperanto-movado, dum kelkaj tagoj. Mi dankas pro ĉio kion mi povis lerni kaj ankaŭ pro la konversacia praktikado kiun mi akiris dum la kunvivado kun la ĉi tieaj samideanoj.

Mi bedaŭrases ne povi resti ĉi tie dum pli da tempo por helpi iom pli. Kompreneble, mi havas miajn proprajn aferojn por zorgi pri ili. Sed, se eblas, mi deziras reveni dum miaj proksimaj ferioj.

Anstataŭ plendi, la plej bona maniero solvi la problemojn estas fari ion ajn, kiel ekzemple, labori kiel volontulo ĉe BEL. Mi konfesas ke mi mem, antaŭe, multe plendis kontraŭ la Ligo, ĉar mi pensis ke ĉe la Ligo neniu bone laboris kaj ne bone zorgis pri la brazila movado. Nun mi konstatis mian eraran opinion. Kiam mi alvenis ĉi tie, mi surpriziĝis pro la kvanto da laboro kaj la ekzisto de malmultaj helpantoj. Estas tiom da leteroj kiuj alvenas ĉiutage ke estas preskaŭ nekredebla afero. Oni perdas multe da tempo por legi, protokoli kaj respondi ilin. Mi konstatis la necesan laboron por fari pakaĵojn, glui paperetojn sur la sendotaj informiloj, tajpi fakturojn, materialon por UEA, Heroldo, El Popola Ĉinio, korekti adresaron ktp ...

Iu ajn povas pensi ke ĉe la Ligo oni ne laboras. Sed, mi povas garantii, ke tio ne estas vero. Venu, sinoferdonu kaj vidu kiel ĉi tie oni laboras. La laboro estas preskaŭ senĉesa: ekde la 8-a ĝis la 12-a kaj multfoje ĝis la 13-a. Ĉiutage, de lundo ĝis sabato, ĉiuj laboras volontule ĉi tie, eĉ la prezidanto, kio estas malofta afero ĉe aliaj organizaĵoj.

Mi estas tre dankema pro tio ĉi ebleco, ĉar mi sentis min ero de la brazila movado; mi sentis min iom utila en tiu nobla idealo de Dr. Zamenhof. Dankon!

Rio de Janeiro, la 3-an de marto 1985 (a) Aristophio A.A. Filho

BEL ELDONAS AFIŜON - BEL ĵus eldonis afiŝon kies ĉefa celo estas informi al la ĝenerala publiko pri okazigo de esperanta kurso. Supre, aperas la teksto "Curso de Esperanto, a lingua internacional"; tuj poste, venas desegnaĵo jam aperinta sur la kovrilo de la prospekto "l milhão de amigos"; sekvas blankaj spacoj ene de tri rektanguloj por meti informon pri la "loko", "periodo" kaj "horaro" de la kurso. La afiŝo taŭgas por meti sur murtabuloj, montrofrenestroj, ktp... kaj jam estas mendebla ĉe BEL. Minimuma kvanto: 100 ekzempleroj. Prezo: 0.33 0.8.7.M.

KULTURAJ KUNVENOJ EN LA SIDEJO DE BEL, EN FEBRUARO - La 2-an de februaro, ĉirkaŭ 30 personoj ĉeestis al la prelego de S-ano Alan G. Romero pri "Portugalio". La preleginto ne nur prezentis interesajn informojn pri tiu lando sed ankaŭ projekciis belegajn diapozitivojn farintajn okaze de lia antaŭnelonga vojaĝo al Portugalio. La 9-an kaj la 23-an de la sama monato, okazis "Konversaciaj Rondoj", kun la meza partopreno de 15 personoj. Interalie, regule prezentiĝas S-anoj Sylla Chaves (Poezio), Jair Salles (Esperantologio), Jorge Campos de Oliveira (Proverboj), Alfredo Aragón (Anekdotoj kaj Muzikoj) kaj Fernando Marinho (Ĉeneralaj Informoj).

NASKIĜIS RADAMÉS - La 2-an de februaro, naskiĝis Radamés, filo de Alfredo kaj Elima Aragón, volontuloj ĉe BEL. La bebo kiu laŭŝajne fariĝos denaska esperantisto, jam vizitas la sidejonde BEL preskaŭ ĉiutage, portante la verdan stelon. Gratulon al la paro kaj longan kaj feliĉan vivon por Radamés!

VIZITOJ AL LA SIDEJO DE BEL, EN FEBRUARO - Victor Sadler, el Alto Paraíso, GO, (4/2); Reinal do Zagheto, el Juiz de Fora, MG, (9/2); Aristophio Andrade Alves F9, el Manaus, AM (12/2); Ivo Pinto Magalhães kaj Luiz Alberto Coelho, el Paraíba do Sul, RJ (23/2).

DONACOJ AL BEL, EN FEBRUARO - Jorge Soares das Neves (RJ): Cr\$ 11.276; Armando Falconi Filho (MG): Cr\$ 3.638; Antonio Rodrigues (RJ): Cr\$ 4.000; Elio Lopes de Oliveira (MG): Cr\$ 4.979; Henrique Knoedt (BA): Cr\$ 4.473. Al ĉiuj, koran dankon!

LIVERITAJ DIPLOMOJ, EN 1985 (ĝis la 28/02) - Baza Kurso: 19; Progresiga: 07.

ELDONITAJ DOKUMENTOJ, EN 1985 (ĝis la 28/02) - Enspeznotoj: 286; Rembursaj enspeznotoj: 27; leteroj: 48; fakturoj: 08.

ALIĜOJ AL BEL, EN 1985 (ĝis la 28/02) - MS: 140; M-1: 92; M-2: 20; DM: 44; BM:02; Entute: 298.

ALIĜOJ AL UEA, EN 1985 (ĝis la 28/02) - MJ: 05; MA: 51; MJ-K: 01; MA-K: 03; Entute: 60.

ABONOJ EN 1985 (ĝis la 28/02) - El Popola Ĉinio: 35; Heroldo de Esperanto: 19; Internacia Komputado: 12; Kontakto: 07.